

## Brazilo pretiĝas por la tutlanda instruado de Esperanto

**Esperanto por lernejoj klasoj. Paroliga metodo kun ekzercaro. Josias Barboza. Braziljo: Unio planeda / Brazila E-Ligo, 2008. 150p. 28cm. Ilus. Kun kd. ISBN 8588913062. Prezo: € 18,00.**

**Esperanto por lernejoj klasoj. Paroliga metodo kun ekzercaro. Gvidlibro por instruistoj. Braziljo: Unio planeda / Brazila E-Ligo, 2008. 164p. 28cm. Ilus. Kun kd. ISBN 8588913054. Prezo: € 18,00**

Jam kelkajn jarojn antaŭ ol la brazila parlamento komencis serioze kaj oficiale trakti pri la laŭelekta instruado de Esperanto en mezlernejoj, la kolego Josias Barboza, sperta lingvoinstruisto, entreprenis kreadon de kompleto de Esperanto-lerniloj. Liaj celoj estis verki lernilon, bazitan sur modernaj materialoj kaj metodoj, kiu evoluigu ĉe la lernantoj ĉefe la interagajn lingvokapablojn kaj ebligu samkonceptan uzon de bone konstruitaj kaj science kunmetitaj lernitaĵoj. Tiel naskiĝis la lernolibro-paro *Esperanto por lernejoj klasoj*.

La monda esperantistaro unuafoje povis enmanigi tiujn lernilojn dum la UK en Bjalistoko, kie libroserve vendiĝis jam la unuaj volumoj de la lernolibro kaj porinstruista aldonaĵo. La instruistaj kolegoj havis eblon vidi kaj prikomenti ankaŭ la duan parton de la serio.

La grandformataj, laŭaspekte tre allogaj libroj kun la aldonaĵoj de sondiskoj impresis la kolegojn. Inter ili s-ro Kurt Fischer el Germanio entreprenis la fakan provlegadon de la dua volumo kaj tiel ekis ankaŭ internacia kunlaboro inter la du kolegoj, kio gvidos la verkon al eĉ pli bona kvalito kaj sentigos en ĝi eŭropan influon.

Necesas aldoni, ke jam la unua volumo de la instrukompleto agordiĝas kun la rekomendoj de la Konsilio de Eŭropo en ĝia Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), kiu celas unuecigi la mezuradon de lingvokapabloj de lernantoj kaj kandidatoj. Mondskala uzo de akordaj lerniloj plifaciligos la kunlaboron de internaciaj projektoj.

### Kio fakte konsistigas la lernopakajon?

Du bunte ilustritaj porlernantaj libroj (volumoj 1 kaj 2) kun ekzercaroj kaj sondiskoj. Krome, la instruisto havas por ambaŭ niveloj gvidlibron kaj helpan teknon, kun preseblaj murbildoj kaj murfrazaro, flankaj tekstoj kaj ekzercaroj.

La porlernanta sondisko enhavas la ĉefajn enkondukajn tekstojn de la lecionoj, kiuj estas rolludataj de esperantistaj "aktoroj". Tio



donas al la lecionoj certan viklecon, havas efikon de motivado kaj havas ankaŭ la ĉarmon de brazila prononcmansiero.

La unua volumo startas de nulo kaj gvidas la lernantojn ĝis la nivelo B1+, kune kun tre riĉa vortostoko kaj multaj ekzercoj, dialogoj, kulturaj kaj movadaj informoj. La finstudintoj de la dua volumo atingas la nivelon B2<sup>1</sup>.

La gvidlibro de la instruisto (fakte baze identa kun la libro de la lernantoj) havas en ĉiu paĝo flankan kaj suban marĝenojn, kun notoj kaj sugestoj pri la plej efika maniero enkonduki aŭ gvidi tiun aŭ sekvontan instruunuon aŭ paroliligilojn. Tiuj notoj kaj sugestoj multe faciligas la prepariĝon de la instruisto kaj ŝparigas al ŝi/li tempon kaj energion. Fakte, laŭ tiu ĉi soci-funkcia metodologio la instruisto ne *instruas*, sed *regisoras* la grupan lernadon, tial kolegoj, ankaŭ kun malpli da spertoj, povas sukcese uzi la materialon.

La helpa teko senpage elŝuteblas de <http://www.lernejojklasoj.net/>, la retejo de la projekto, kaj povas esti libere modifita de la instruisto laŭ ŝiaj/liaj bezonoj.

La metodo estas baze paroliga, la materialo konstruiĝas sur riĉe ilustritaj kaj variaj dialogoj, kiuj plej ofte el multaj vidpunktoj ekzercigas kaj reekzercigas pri la lernendaĵoj. La gramatikaĵoj trateksas la libron, prezentiĝas en klaraj kaj bone strukturitaj resumoj, tamen ne fariĝas unuagradaj celoj de la lingvolernado. Ilin la kursanoj alproprigas en la multnombraj ekzemplofrazoj tra la sennombraj dialogoj kaj ekzercoj, kiuj ne malhavas kulturajn konojn pri Esperanto kaj stimolon al transkultura komunikado pere de la internacia lingvo. La leksiko reserĉeblas en la librofina indekso kun indikoj de la koncernaj lecionoj kaj en kelkaj okazoj unulingva vortklarigo akompanas la vortojn. La eldonaĵoj estas bunte ilustritaj, kaj kvankam laŭstile kaj laŭkvalite la bildoj ne estas homogenaj, la libroj aspekte estas modernaj, uzanto-amikaj. Krome ĉarmas la etaj ikonoj, kiuj grafike indikas la diversajn celojn de la eroj.

1) Pri la nivelo de la Komuna Eŭropa Referenckadro oni trovas informojn ĉe <http://www.edukado.net/pagina/REFERENCKADRO/18364/>

La libro servas ankaŭ kiel laborkajero, la paperkvalito facile ebligas plenumi skribe la ekzercojn kaj taskojn, fari notojn en la libro.

Se menciitaj tamen negativan trajton ni diru, ke la instruantoj povos havi nekutiman problemon, nome la abundecon, kiu por tiuj, kiuj havas relative malmultajn enklasajn lecionhorojn, necesigas zorgan elektadon de la plej gravaj partoj kaj devon klarigi al la kursanoj kiel memstare prilabori la reston de la lecionoj.

Tre verŝajnas, ke ĉi tiu estos unu el la plej popularaj Esperanto-lerniloj en la sekvaj jaroj de la Esperanto-instruado kaj kun bonaj administrado kaj porinstruistaj trejnadaj pri ĝia uzo la kolegoj

sukcese povos utiligi ĝin ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en multaj aliaj partoj de la mondo.

Por tiuj, kiuj volas aĉeti ĝin ni diru, ke danke al la malavara mecenato D-ro Ulisses Riedel de Rezende estis produktitaj entute 1500 libroj (1000 porlernantaj + 500 porinstruistaj) de la unua parto. La dua volumo kun gvidlibro aperis printempe de 2010.

Estas bone scii, ke kaze de pozitiva decido de la enlandaj politikistoj, la brazilanoj jam havos bonan lernolibran kandidaton kaj modele kaj efike laborantan landan ILEI-sekcion. Restas nur la grandaj taskoj trejni sufiĉajn instruistojn kaj ekinstrui Esperanton. Bonan laboron por la nobla celo kaj sukceson al la brazilaj kolegoj!

**Katalin Kováts**

# Ŝlosila duonpopularigo

**Lingvo kaj menso. Noam Chomsky. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Antaŭparoloj de Probal Dasgupta kaj Hiroshi Nagata. Serio "Scienca Penso" n-ro 2. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2010. 188p. 21cm. ISBN 9789290171140. Prezo: € 9,90**



La usona lingvisto Noam Chomsky estas fama ne nur kiel fondinto de la tiel nomata genera lingvistiko, sed ankaŭ multe pli vaste pro sia politika verkaro. Tiun lastan ni ekkonis dum la lasta jardeko per kelkaj artikoloj tradukitaj kaj enretigitaj ĉe *Le Monde Diplomatique en Esperanto*, sed nun troviĝas esperantigita ankaŭ lia *Lingvo kaj menso*, kolekto de lingvistikaj kaj scienco-filozofiaj eseoj, kiuj parte jam estis tradukitaj al multaj naciaj lingvoj.

La libro originale estas sufiĉe kaose organizita. Ĝi aperis en tri eldonoj (1968, 1972 kaj 2006) kaj la enhavo kreskis de tri al ses kaj fine sep eseoj. Ili estas tiel longaj ke la nura manko de subĉapitroj (krom en ĉapitro 5) igas ilin malfacile legeblaj. Pliaj baroj al kompreno estas la akademia stilo, malfacileco de la temo kaj la malkutima pensmaniero de Chomsky. La ĉapitroj estis verkitaj en la ordo 5-1-2-3-6-4-7, sed se oni volas komenci per la malplej malfacila kaj fini per la plej malfacila, mi rekomendas la ordon 4-6-7-5-1-3-2. La ne malpli ol kvin antaŭparolojn – du por la Esperanta eldono kaj tri de Chomsky mem por ĉiu originala – oni preferu legu laŭ la presita ordo.

En siaj antaŭparoloj Probal Dasgupta kaj Hiroshi Nagata taskis al si ne nur doni superrigardon pri la evoluo de la genera lingvistiko, sed ankaŭ rilatigi kaj harmoniigi ĝian ekziston kun tiu de Esperanto. Laŭ mi, ili ne plene sukcesis. La tradicia vido de la lingvo, daŭre konservata ne nur en la Esperantomovado, estas de arbitre kunmetita socia komunikilo. La genera lingvistiko renversas ĉiujn kvar partojn kaj vidas la lingvon kiel nature kreskantan esprimilon de la individuo. La konsekvencoj kraĉas en la vizaĝon de la komuna saĝo: Ne vere ekzistas malsamaj lingvoj, kaj Esperanto do estas “nur” unu plia konkreta dialekto de la unusola *abstrakta* homa lingvo, ĉu rekte per si mem, ĉu nerekte per “parazitado” de la gepatra aŭ alia dialekto regata de la unuopa parolanto. Kvankam ĉi tiun gravan punkton la antaŭparoloj bedaŭrinde ne disvolvas, ili legindigas

la libron al multe pli vasta publiko.

Oni rajtas demandi sin kial oni elektis tradukigi ĝuste ĉi tiun verkon kaj ne ekzemple *Novaj horizontoj* aŭ *Pri naturo kaj lingvo*, menciitajn sur ĝia dorso. Ili estas pli aktualaj kaj la lasta enhavas intervjuon, en kiu Chomsky devas esprimi sin iom pli kompreneble ol kiam li mem verkas. Tamen la verko sidas tre bone kiel la dua ero de la serio “Scienca Penso”. Unue ĝi estas “mejlŝtona el historia vidpunkto”, laŭ la kriterio menciita de la seria redaktoro José Antonio Vergara. Due ĝi tuŝas iujn neadekvatajn punktojn de la teorio de Karolo Darvino – kies *La origino de specioj* tre konvene estas la unua libro de la serio. Trie, Chomsky en ĉi tiu libro iom pli detale diskutas pri Ferdinand de Saussure, aparte interesa al la esperantista publiko.

La tradukinto Edmund Grimley-Evans ĝenerale brile solvis la gigantan taskon. La nomojn de la plej famaj sciencistoj de la pasinteco li esperantigis, kio precipe pro la adjektivo *kartezia* ŝajnas esti bona decido. Aliflanke la hazardaj nomoj en frazekzemploj devus aperi en akuzativigebla formo, dum male oni preferus legi ekzemple netradukitan NP anstataŭ SF – tuj rekoni la konvencian mallongigon viditan aŭ revidotan alilingve estus pli oportune por la leganto. Ĉiuj vortoj estas troveblaj en PIV de 2005 aŭ klarigitaj en la teksto mem, sed malgraŭ tio utilis aldoni antaŭnoton pri la elekto de la plej gravaj terminoj, kiel okazis en la unua franca traduko. Neeviteble, pluraj ŝlosilaj vortoj mankas en la pli fruaj eldonoj de PIV.

Restas iuj malglataĵoj en la traduko, sed ĉefkulpa pri ili ŝajnas esti mallaboremo aŭ manko de provleganto. Traŝteliĝis du gravetaj eraroj, nome *rekursa* (anstataŭ la PIVaj *rekursia* aŭ *rikursa*) kaj *biontologio* (la originalo havas *natural history* kaj temas simple pri naturhistorio). Ankaŭ estu menciita *frazero*, kiu pli bone estus *frazparto* (kiel en PMEG) aŭ *frazdivido*, se oni nepre volas eviti la neologismon *sintagma*. Kontraste *leksikero* estas frape bona traduko de *lexical item*, dum pri *ingi* por